

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
stampato da **atena.net** - Grisignano di Zocco (VI)

Anno 97 - n. 3
MAGGIO - GIUGNO 2018



MAJO 2018



Vogliamo commemorare il mese dedicato a Maria con un documento dei primi secoli.

Ni volas memori la monaton dediĉitan al Maria per skribo de la unuaj jarcentoj.

Dalle 'Lettere' di sant'Atanasio ad Epitteto

El la 'Leteroj' de S-akta Atanzio al Epitteto

Il Verbo di Dio, come dice l'Apostolo, «della stirpe di Abramo si prende cura. Perciò doveva rendersi in tutto simile ai fratelli» (*Eb 2,16.17*) e prendere un corpo simile al nostro. Per questo Maria ebbe la sua esistenza nel mondo, perché da lei Cristo prendesse questo corpo e lo offerisse, in quanto suo, per noi.

Perciò la Scrittura quando parla della nascita del Cristo dice: «Lo avvolse in fasce» (*Lc 2,7*). Per questo fu detto beato il seno da cui prese il latte. Quando la madre diede alla luce il Salvatore egli fu offerto in sacrificio.

Gabriele aveva dato l'annuncio a Maria con cautela e delicatezza. Però non le disse semplicemente: colui che nascerà *in* te, perché non si pensasse a un corpo estraneo a lei, ma: *da* te (*cfr. Lc 1,35*), perché si sapesse che colui che ella dava al mondo aveva origine proprio da lei.

Il Verbo, assunto in sé ciò che era nostro, lo offrì in sacrificio e lo distrusse con la morte. Poi



Sankta Atanzio

La Vorto de Dio, kiel diras la Apostolo, «pri la idaro de Abraham li zorgas. Tial li devis en ĉio similiĝi al siaj fratoj» (*Heb 2,16.17*) kaj preni korpon similan al la nia. Pro tio Maria ekestis en la mondo, por ke el ŝi Kristo prenu ties korpon kaj ĝin oferu, kiel sia, al ni.

Pro tio la Skribo, kiam ĝi parolas pri la nasko de Kristo diras: «Ŝi ĉirkaŭvindis lin» (*Luk 2,7*). Pro tio estis nomata beata la sino el kiu li prenis la lakton. Kiam la patrino naskis al la lumo la Savanton, li estis oferdonita.

Gabrielo donis la anoncon al Maria singarde kaj delikate. Sed li ne diris simple: tiu, kiu naskiĝos *en* vi, ĉar oni ne pensu pri korpo al ŝi fremda, sed: *de* vi (*kp. Luk 1,35*), por ke oni sciu ke, tiu

kiun ŝi naskos, elvenas efektive de ŝi.

La Vorto, preninte en si mem tion, kio estis nia, ĝin oferdonis kaj detruis pere de la morto.

rivestì noi della sua condizione, secondo quanto dice l'Apostolo: Bisogna che questo corpo corrottile si vesta di incorruttibilità e che questo corpo mortale si vesta di immortalità (*cf.* 1 Cor 15,53).

Tuttavia ciò non è certo un mito, come alcuni vanno dicendo. Lungi da noi un tale pensiero. Il nostro Salvatore fu veramente uomo e da ciò venne la salvezza di tutta l'umanità. In nessuna maniera la nostra salvezza si può dire fittizia. Egli salvò tutto l'uomo, corpo e anima. La salvezza si è realizzata nello stesso Verbo.

Veramente umana era la natura che nacque da Maria, secondo le Scritture, e reale, cioè umano, era il corpo del Signore; vero, perché del tutto identico al nostro; infatti Maria è nostra sorella poiché tutti abbiamo origine in Adamo.

Ciò che leggiamo in Giovanni «il Verbo si fece carne» (*Gv 1,14*), ha dunque questo significato, poiché si interpreta come altre parole simili.

Sta scritto infatti in Paolo: Cristo per noi divenne lui stesso maledizione (*cf.* Gal 3,13). L'uomo in questa intima unione del Verbo ricevette una ricchezza enorme: dalla condizione di mortalità divenne immortale; mentre era legato alla vita fisica, divenne partecipe dello Spirito; anche se fatto di terra, è entrato nel regno del cielo.

Benché il Verbo abbia preso un corpo mortale da Maria, la Trinità è rimasta in se stessa qual era, senza sorta di aggiunte o sottrazioni. È rimasta assoluta perfezione: Trinità e unica divinità. E così nella Chiesa si proclama un solo Dio nel Padre e nel Verbo.

Poste li vestis nin el sia kondiĉo, laŭ la diro de la Apostolo: Estas necese, ke ĉi tiu korpo putrema surmetu senputrecon, kaj ke ĉi tiu mortema surmetu senmortecon (*kp.* 1 Kor 15,53).

Tamen tio ne estas certe mito, kiel kelkaj diradas. Malproksima de ni tiu penso. Nia Savanto estis vere homo, kaj el tio alvenis la savo de la tuta homaro. Neniel nia savo povas esti nomata fiktiva. Li savis la tutan homon, korpon kaj animon. La savo realiĝis en la Vorto mem.

Vere homa estis la naturo naskiĝinta el Maria, laŭ la Skriboj, kaj reala, t.e. homa, estis la korpo de la Sinjoro; vere, ĉar tute simila al la nia; fakte Maria estas nia fratino, ĉar ni ĉiuj originis el Adamo.

Tio, kion ni legas en Johano «la Vorto fariĝis karno» (*Gv 1,14*), havas do ĉi tiun signifon, ĉar oni interpretas tion kiel aliajn similajn vortojn.

Fakte estas skribite en Paŭlo: Kristo mem por ni fariĝis malbeno (*kp.* Gal 3,13). La homo per ĉi tiu intima kunigo kun la Vorto ricevis grandegan riĉaĵon: el la kondiĉo de morteco li iĝis nemortema; ligita al la fizika vivo, li iĝis partoprenanto de la Spirito; malgraŭ farita el tero, li eniris en la regnon de la ĉielo.

Kvankam la Vorto alprenis morteman korpon el Maria, la Triunuo restis en si mem kiel ĝi estis, sen iaj ajn aldonoj aŭ deprenoj. Ĝi restis absoluta perfekteco: Triunuo kaj ununura dieco. Tiel en la Eklezio oni proklamas unuran Dion en la Patro kaj en la Filo.

MARIA MATER ECCLESIAE

A conclusione della terza sessione del Concilio, papa Paolo VI dichiarò Maria «Madre della Chiesa». Ora papa Francesco ha stabilito che la memoria della «Beata Vergine Maria, Madre della Chiesa», sia celebrata nel Calendario Romano il Lunedì dopo Pentecoste.



Konklude de la tria sesio de la Koncilio, papo Paŭlo la sesa, deklaris Marian «Patrino de la Eklezio». Nun, papo Francisko, starigis, ke la memoro de la «Beata Virgolino Maria, Patrino de la Eklezio», estu celebrata, en la Roma Kalendario, la Lundo post Pentekosto.

EKUMENAJ BIBLIAJ TAGOJ 2018

en Majenco [Mainz] (7-11 Marto)



Partoprenantoj en la Bibliaj Tagoj ĉe la "Citadelo" de Majenco

La ĉi jaraj Ekumenaj Bibliaj Tagoj okazis de merkredo posttagmeze, la 7an de Marto, ĝis la tagmezo de la posta dimanĉo, en Majenco (ĉefurbo de Rejnlando-Palatinato, Germanio) en la Junulargastejo *Jugendherberge*, ĉe la bordo de la rivero Rejno.

Partoprenis 24 homoj, plej multe el Germanio, sed ankaŭ el Slovakio, Ĉeĥio, Svislando, kaj eĉ kvar el Italio.

Organizis la Esperanto-Ligo por Kristanoj en Germanujo. La temo estis: "Virinoj en la Biblio". Lastmomente la ĉefa organizanto, pastoro Wolfram Rohloff ne povis partopreni, pro tio la temo estis prelegata de pluraj partoprenantoj, kiuj sin preparis pri kelkaj eroj. Ĵaŭdon matene pastro Albrecht Kronenberger enkondukis la temon, per ĝenerala rigardo sur la bildo de la virinoj en la Malnova Testamento, kaj poste parolis pri Eva (*Gen 2*) kaj pri la "kapabla edzino" (*Sen 31*). Tuj poste Stefan Lepping parolis pri la virinoj en la Nova Testamento, aparte pri la eksedziĝo (*Mat 19*), la adultulino (*Joh 8*) kaj la rolo de la virino laŭ Paŭ-

lo (*Efe 5 – Kol 3*). La postan matenon envicigis la prelegoj de Karl Heinz Schaeffer pri Mirjam, fratino de Moseo (*Eli 2, Eli 15, Nom 12*), kaj de Norbert Südland, pri la filino de Jiftaĥ (*Juĝ 11*). Sabaton matene estis la vico de Hedwig Fischer, pri Maria Magdalena (*Joh 20 – Luk 24*), Christa Koß pri Maria kaj Marta el Betania (*Luk 10 – Joh 11*), kaj Albrecht Kronenberger pri Maria, la patrino de Jesuo (*Joh 2*). Dimanĉon matene Reinhard Pflüger parolis pri la edzino de Petro, malofte pritraktata en la Biblio.

La posttagmezoj estis dediĉitaj al la ekskursoj. Ĵaŭdon al la preĝejo de St. Stefano kun la vitraloj de Chagall kaj al la 'Citadelo' kun la romia Kolono de Druzo kaj la restaĵoj de la romia teatro; vendredon, vizito de la Katedralo kaj de la Muzeo de Gutenberg (kiu naskiĝis kaj vivis en ĉi tiu urbo). Sabaton ni vizitis la Nuturhistorian Muzeon kaj la Landan Muzeon.

La vesperoj estis dediĉitaj al babilado, escepte dum la unua vespero, kiam la ĉina edzino de Ulrich Matthias, Nan Wang, proponis al ni ĉingong-ekzercadon.

La lastan vesperon pastro Albrecht Kronenberger celebris S.tan Meson en la kunveno en ekumena etoso.

Ĉiumatene malgranda grupo kolektiĝis en la kunven-salono por la rozario, kaj post la matenmanĝo estis komuna preĝado kun kantoj akompanataj de Stefan Lepping ĉe fortepiano. Li ne mankis, de tempo al tempo, kantigi nin per kantoj el la ekumena preĝlibro Adoru.

Kiel kutime la etoso inter ni estis afabla kaj ankaŭ la vintra vetero ne malhelpis. La graveco de ĉi tiuj renkontiĝoj stas ĝuste en tiu ekumena etoso. Ni devas pro tio danki precipe la sekretarion Rudolf Fischer, kiu multe sin dediĉis por la sukceso de la renkontiĝo.



La kvar italoj en la ĝardeno de la kongresejo antaŭ la rivero Rejno

Intenções dell'Apostolato della Preghiera 2018 Intencoj de la Preĝa Apostol-agado 2018

Maggio (per l'evangelizzazione):

Perché i fedeli laici compiano la loro specifica missione mettendo la loro creatività al servizio delle sfide del mondo attuale.

Giugno (universale):

Perché le reti sociali favoriscano la solidarietà e il rispetto dell'altro nella sua differenza.

Majo (por la evangelizado):

Por ke la laikaj fideluloj plenumu sian apartan mision metante sian kreemon al la servado de la defioj de la nuntempa mondo.

Junio (universala):

Por ke la sociaj retoj favorigu la solidarecon kaj la respekton de la aliulo en lia malsameco.

L'esperienza di vita di un nostro associato ormai 96-enne, il cavalier Mario Gedda di Vercelli, porta con sè preziosi tesori di saggezza. Ne ha tradotto uno in esperanto e ce ne fa omaggio.

== Pri dek aferoj Dio pridemandos vin ==

- 1 Dio ne demandos al vi, kiun modelon de aŭtomobilo vi uzis,
... al vi Li demandos, kiom da homoj vi pretreveturis.
- 2 Dio ne demandos al vi, la kvadratajn metrojn de via hejmo,
... al vi Li demandos, kiom da homoj, vi gastigis.
- 3 Dio ne demandos al vi, la firmo-markon de la vestaĵoj en via ŝranko,
... al vi Li demandos, kiom da homoj vi helpis sin vesti.
- 4 Dio ne demandos al vi, kiom alta estis via salajro,
... al vi Li demandos, ĉu vi vendis vian konsciencon por ĝin akiri.
- 5 Dio ne demandos al vi, kia estis via stud-titolo,
... al vi Li demandos, ĉu vi faris vian laboron plejeble bone laŭ via kapablo.
- 6 Dio ne demandos al vi, kiom da amikoj vi havis,
... al vi Li demandos, kiom da homoj konsideris vin sia amiko.
- 7 Dio ne demandos al vi, en kia kvartalo vi vivis,
... al vi Li demandos, kiel vi traktis viajn najbarojn.
- 8 Dio ne demandos al vi, la koloron de via haŭto,
... al vi Li demandos, la purecon de via animo.
- 9 Dio ne demandos al vi, kial vi malfruis en la serĉado de la savo,
... li portos vin kun amo al via ĉiela hejmo, kaj ne al la pordo de la infero.
- 10 Dio ne demandos al vi, al kiom da homoj vi parolis pri Li kaj pri via kredo,
... al vi Li demandos, ĉu vi hontis farante tion.



Dio ne kulpigas: li petas nur, ke vi prediku per via ekzemplo.



FRANCISKANAJ FONTOJ

Zorge de frato Pierluigi Svaldi

Vincere a tutti i costi

Senza un po' di ambizione non si ottiene niente. Per risultare vincitori dobbiamo superare le prove della vita, utilizzando tutte le energie disponibili. Questo serve per esternare l'oggetto della nostra preghiera. La preghiera più convinta è vincere a tutti i costi.

Anche Cristo ha vinto la morte e tutto quello che essa provoca. Quale signore della vita chiede a tutti noi di fare altrettanto.

Nelle Fonti Francescane si legge come Francesco d'Assisi abbia vinto in un momento particolare. Nella sua Leggenda san Bonaventura ha voluto uniformare i vari racconti scritti negli ultimi trent'anni su un Francesco troppo umano e poco mistico. Nei suoi intenti questa fonte doveva sostituire addirittura tutte le fonti precedenti. Infatti san Bonaventura viene considerato come il secondo fondatore dell'Ordine dei frati Minori.

Originale è lo stile del raccontare.

Una notte, mentre stava pregando in una celluzza dell'eremo di Sarteano, l'antico nemico lo chiamò per tre volte: «Francesco, Francesco, Francesco!». Gli rispose chiedendo che cosa volesse; e quello, ipocritamente: «Non c'è nessun peccatore al mondo, al quale Dio non usi misericordia, se si converte. Ma chiunque si uccide da se stesso con le sue dure penitenze, non troverà misericordia in eterno».

L'uomo di Dio intuì immediatamente, per rivelazione, l'inganno del nemico che tentava di richiamarlo alla

Venki ĉiukoste

Sen iom da ambicio oni akiras nenion. Por rezultoj venkintoj, ni devas superi la elprovojn de la vivo, utiligante ĉiujn disponeblajn energiojn. Tio ĉi utilas por esprimi la objekton de nia preĝo. La plej konvinka preĝo estas venki ĉiukoste.

Ankaŭ Kristo venkis la morton kaj ĉion, kion ĝi kaŭzas. Kiel sinjoro de la vivo, li petas nin ĉiujn fari la samon.

En la Franciskanaj Fontoj oni legas kiel Francisko el Asizo venkis en aparta momento. En sia Legendo sankta Bonaventura volis unuformigi la diversajn rakontojn verkitaĵojn en la antaŭaj tridekaj jaroj pri Francisko tro humana kaj malmulte mistika. Laŭ siaj intencoj tiu ĉi fonto celis anstataŭigi eĉ ĉiujn antaŭajn fontojn. Fakte S-ka Bonaventura estas konsiderata kiel la dua fondinto de la Ordeno de la Minoraj Fratoj.

Aparta estas la stilo de la rakonto.

Iun nokton, dum li estas preĝanta en ĉeleteo de la eremitejo de Sarteano, la antikva malamiko vokis lin trifoje: «Francisko, Francisko, Francisko!». Li respondis al li, petante kion li volas; kaj tiu, hipokrite diris: «Neniu pekulo ĉeestas en la mondo, al kiu Dio ne uzas mizerikordon, se li konvertiĝas. Sed ĉiu ajn, kiu mortigas sin mem per siaj duraj pentopunoj, neniam trovos mizerikordon».

La dia homo tuj intuiciis, per revelacio, la trompon de la malamiko, kiu tentis allogi lin al la tepideco, kaj li ri-



tiepidezza e ne ebbe la conferma da quello che avvenne subito dopo.

Infatti senti divampare dentro di sé una grave tentazione sensuale, alimentata dal soffio di quel tale *che ha un fiato ardente come brace*. Non appena ne avverti le avvisaglie, l'amante della castità si tolse l'abito e incominciò a flagellarsi molto forte con una corda.

«Ehilà, diceva, frate asino, così ti conviene restare, così prenderti le battiture. Perché la tonaca serve alla Religione e porta in sé il sigillo della santità: non è lecito, a un libidinoso, rubarla. Se vuoi andare in qualche posto, va' pure, cammina!».

Poi, animato da meraviglioso fervore di spirito, spalancò la cella, uscì fuori nell'orto e, immergendo nella neve alta il corpicciolo già denudato e prendendo neve a piene mani, incominciò a fabbricare sette blocchi. E mettendoseli davanti, così parlava al suo uomo esteriore: «Ecco, questo blocco più grande è tua moglie, questi quattro sono due figli e due figlie; gli altri due sono un servo e una serva, che bisogna tenere per le necessità di casa. Adesso, spicciati a vestirli tutti, perché muoiono di freddo. Se invece le molte preoccupazioni che loro ti danno, ti infastidiscono, datti da fare per servire soltanto al Signore!».

Subito il tentatore se ne andò via sconfitto, e il Santo ritornò nella cella con la vittoria in mano. Si era raggelato ben bene al di fuori, ma nel suo interno aveva estinto il fuoco della passione così efficacemente che, da allora in poi, non provò mai più niente di simile.

Un frate, che quella stessa notte vegliava in preghiera, siccome la luna camminava assai chiara nel cielo, poté osservare tutta quanta la scena. Quando il santo lo venne a sapere, svelò al frate come la tentazione si era svolta e gli comandò di non far saper niente a nessuno di quanto aveva visto, finché egli era vivo.

Un modo di raccontare molto spirituale, ma che ha influito per molti secoli sulla formazione dei frati. Oggi forse un po' meno.

cevis la konfirmon el tio, kio okazis tuj poste.

Fakte li sentis ekflami en si mem intensan sensan tenton, kreskigitan de la elspiro de tiu, *kiu havas spiron ardan kiel braĝo*. Tuj kiam li perceptis ties antaŭsignojn, la amanto de la ĉasteco demetis la veston kaj tre forte ekskurĝis sin per ŝnuro.

«Hej do, li diris, frato azeno, tiel al vi decas resti, tiel preni la frapojn. Ĉar la froko utilas al la Religio kaj portas en si mem la sigelon de la ĉasteco: ne decas al voluptavida ŝteli ĝin. Se vi volas iri aliloken, bonvolu iru, rapidu!».

Kaj poste, instigita de mirinda fervoro en spirito, li dismalfermis la ĉelon, eliris foren en la legomĝardenon kaj, mergante en la altan neĝon la jam nudigitan korpeton kaj prenante neĝon plenmane, li ekkonstruis sep blokojn. Kaj metante ilin antaŭ si mem, tiel li paroladis al sia ekstera homo: «Jen, tiu ĉi pli granda bloko estas via edzino, tiuj ĉi kvar estas du filoj kaj du filinoj; la du aliaj estas servisto kaj servistino, kiujn necesas teni por la dom-necesoj. Nun, urĝiĝu vesti ilin ĉiujn, ĉar ili mortas pro la frosto. Male, se la multaj zorgoj, kiujn ili donas al vi, ĝenas vin, klopodu servi nure la Sinjoron!».

Tuj la tenta diablo foriris venkita, kaj la Sanktulo revenis en la ĉelon kun la venko enmane. Li tute ja frostiĝis ekstere, sed en sia intimaĵo li tiel efike estingis la fajron de la pasio, ke li ekde tiam neniam travivis ion similan.

Frato, kiu en la sama nokto vigilis en preĝo, pro tio ke la luno paŝis sufiĉe klara en la ĉielo, povis observi la tutan scenon. Kiam la sanktulo eksciis ĝin, rivelis al la frato, kiel la tento okazis kaj ordonis al li, ke li sciigu al neniu tion, kion li vidis, almenaŭ dum li, Francisko, estas vivanta.

Rakontmaniero ege spirita, sed ĝi influis dum multaj jarcentoj la forĝadon de la fratoj. Hodiaŭ eble malplie.



Pri nia Lingvo

La zamenhofa ideo.

Non sono sufficienti una grammatica e un dizionario perché una lingua si possa dire appartenente ad un popolo, il popolo esperantista. È importante che abbia anche una unità di stile, il meno possibile influenzato dalla madrelingua del parlante. In uno dei suoi 'LINGVAJ RESPONDOJ' Zamenhof fa l'esempio del seguente testo in esperanto, grammaticalmente corretto, ma scritto da un russo secondo lo stile della propria lingua:

«Favora Regnestro!

Honoro havas alkuŝigi, kio laŭ kaŭzo de antaŭskribita al mi kun kuracisto kuraco mi en efektiva tempo ne en stato elpleni de donita kun mi al vi promeso; apud kio postaperigas, ke mi turnos sin al domo tra du monatoj, ne pli frue de fino de Aŭgusto».

Nello stile dell'esperanto suonerebbe così:

«Estimata sinjoro! Mi havas la honoran raporton al vi, ke kaŭze de kuracado, rekomendita al mi de la kuracisto, mi en la nuna tempo ne povas plenumi la promeson, kiun mi donis al vi; mi ankaŭ sciigas vin, ke mi revenos hejmen post du monatoj, ne pli frue ol en la fino de Aŭgusto».

Per questo Zamenhof pubblica nel 1903 la "FUNDAMENTA KRESTOMATIO", un'antologia di testi che facciano da modello di stile per gli esperantisti. Nella sua prefazione afferma:

«Ĉiuj artikoloj en la Fundamenta Kresto-

matio estas aŭ skribitaj de mi mem, aŭ – se ili estas skribitaj de aliaj personoj – ili estas korektitaj de mi en tia grado, ke la stilo en ili ne deflankiĝu de la stilo, kiun mi mem uzas».


Si tratta di un volume di più di 400 pagine suddiviso in 8 parti:

- I. EKZERCOJ: una raccolta di esercizi che verranno poi inseriti nel FUNDAMENTO.
- II. FABELOJ KAJ LEGENDOJ.
- III. ANEKDOTOJ.
- IV. RAKONTOJ.
- V. EL LA VIVO KAJ SCIENCOJ.
- VI. ARTIKOLOJ PRI ESPERANTO, che comprendono anche la traduzione in E-o delle 16 regole.
- VII. POEZIO.
- VIII. ALDONO, che contiene solo la "Preĝo sub la verda stendardo".

Così come lo stile del-

l'italiano odierno è diverso da quello di un secolo fa, anche lo stile dell'esperanto è cambiato con il tempo per cui, la *KRESTOMATIO*, letta ora, sa di antico; la sua importanza sta nell'aver posto una base su cui la lingua si evolvesse con uniformità di stile. Dalla prima edizione si è giunti all'odierna, diciottesima, senza aggiornamenti di stile. Nelle prime edizioni Zamenhof si è limitato a correggere qualche errore di stampa. Nella prefazione della quinta edizione, del 1907, scrive infatti:

«Dum la trarigardado mi trovis diversajn esprimojn, kiuj siatempe ŝajnis al mi bonaj,



sed kiuj nun al mi ne plaĉas kaj kiujn mi volonte ŝanĝus; mi tamen tion ĉi ne faris, ĉar mi estas konvinkita, ke por verko, kiu havas la celon subtenadi unuformecon de stilo inter ĉiuj esperantistoj, severa konstanteco estas multe pli grava, ol plena perfekteco,

kaj la utilo de la faritaj ŝanĝoj estus multe pli malgranda ol la malutilo...».

Le edizioni più recenti non modificano i testi originali ma riportano, all'occorrenza delle note di aggiornamento a piè pagina, a testimonianza della vitalità della lingua.

Ĉe la voj-komenco.

Questa volta vediamo alcune preposizioni che hanno più di un significato e che talvolta possono creare incertezze nel cogliere il preciso senso di una frase.

Vediamo le principali:

Je: per definizione la preposizione 'je' non ha un preciso significato. La 14a regola della 'FUNDAMENTA GRAMATIKO' infatti dice:

"Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon; sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian nome prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion "je", kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio "je" oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio". In origine infatti 'je' era molto più usata di oggi. Con l'evoluzione della lingua si sono meglio precisati i significati delle varie preposizioni e anche quello di 'je' si è consolidato.

L'uso più comune di *je* è per indicare un dato orario o un dato momento:

- *Mi venos morgaŭ je la oka kaj duono*
- Verrò domani alle otto e mezza.
- *Ni revidiĝos je Kristnasko*
- Ci rivedremo a Natale.

Negli altri casi il complemento di tempo è in generale espresso con l'accusativo o con un avverbio o con la preposizione 'en'.

Je è usata anche per indicare parti del corpo interessate da qualcosa:

- *Ŝi malsaniĝis je la piedoj*
- Si è ammalata ai piedi.

– *Li kaptis min je la brako*

– Mi ha preso per il braccio
(cioè: per il mio braccio).

Notare la differenza con:

- *Li kaptis min per la brako*
- Mi ha preso con il braccio
(cioè: con il suo braccio).

Viene anche usato in alternativa ad altre preposizioni, o all'accusativo, specie quando queste hanno più di un significato:

- *Li preterpasis la preĝejon je cent metroj*
- Oltrepassò la chiesa di cento metri
(anche per evitare il doppio accusativo:
- *Li preterpasis la preĝejon cent metrojn*).

– *Glaso plena je vino =*

Glaso plena de vino

– Bicchiere pieno di vino.

– *Li estas unu jaron pli juna ol mi =*

Li estas je unu jaro pli juna ol mi

– È un anno più giovane di me.

– *Li edziĝis kun ŝi = Li edziĝis je ŝi*

– Si è sposato con lei.

È usata con il verbo '*kredi*' quando significa 'credere nell'esistenza di':

– *Kredi je Dio* – Credere in Dio.

– *Kredi je la senmorteco de la animo*

– Credere nell'immortalità dell'anima.

Di fatto '*kredi*' ha più di un significato: si può credere a qualcuno, *kredi al iu* (cioè che dica la verità); si può credere a qualcosa, *kredi ion* (cioè che la cosa sia vera).

De: questa preposizione ha molteplici significati. Principalmente è usata per i complementi di specificazione, di provenienza e

di agente. Può esprimere il soggetto o l'oggetto di un'azione, l'appartenenza, l'origine, la misura, la causa; per questo richiede un po' di attenzione per evitare equivoci.

Vediamo qualche esempio:

– *Li estis forprenita de sia patrino*

– Fu portato via da sua madre

In questo caso non si sa se la madre è complemento d'agente e di provenienza. È meglio dire, nel primo caso:

– *Li estis forprenita fare de sia patrino*

– Fu portato via ad opera di sua madre e nel secondo caso:

– *Li estis forprenita disde sia patrino*

– Fu portato via a sua madre.

– *Ĉi tiu domo estas heredaĵo de mia avo*

– Questa casa è l'eredità di mio nonno.

Non si sa se il nonno ha dato o ha ricevuto l'eredità. È meglio dire, nel primo caso:

– *Ĉi tiu domo estas heredaĵo el mia avo*

e nel secondo caso:

– *Ĉi tiu domo estas heredaĵo al mia avo.*

– *Hieraŭ okazis vizito de la direktoro*

– Ieri avvenne una visita del direttore.

Non si sa se il direttore è visitante o visitato. È meglio dire, nel primo caso:

– *Hieraŭ okazis vizito fare de la direktoro*

e nel secondo caso:

Hieraŭ okazis vizito al la direktoro

(o anche *ĉe la direktoro*).

Attenzione; non sempre l'italiano 'di' si traduce in esperanto con 'de':

– una dozzina di rose = *dek-duo da rozoj*

– morire di fame = *morti pro malsato*

e viceversa:

– tazza da tè = *taso de teo*

– amato dal re = *amata de la reĝo*.

Krom: questa preposizione ha, come noto, due significati: 'eccetto' e 'oltre' ('*escepta krom*' kaj '*aldona krom*'). Zamenhof, in uno dei suoi *LINGVAJ RESPONDOJ* spiega che ha l'unico significato di "a parte":

«*Krom*» per si mem esprimas nek esce-

pton, nek aldonon, ĝi esprimas nur apartigon, sed ĉu tiu apartigo estas farata por ion forigi, aŭ kontraŭe, por ĝin pli akcenti, tion montras la senco de la frazo mem».

E aggiunge l'esempio:

– *Estis ĉiuj miaj fratoj krom Petro*

– C'erano tutti i miei fratelli a parte Pietro (in questo caso si intuisce immediatamente che 'a parte' significa 'eccetto').

Invece in:

– *Krom Petro, estis ĉiuj miaj fratoj*

– A parte Pietro, c'erano tutti i miei fratelli sorge il dubbio se la frase è da intendersi:

– Eccetto Pietro, c'erano tutti i miei fratelli oppure:

– Oltre Pietro, c'erano tutti i miei fratelli.

In questi casi Zamenhof propone:

Nel primo caso:

– *Esceptinte Petro, estis ĉiuj miaj fratoj*

e nel secondo caso:

– *Krom Petro, estis ankaŭ ĉiuj miaj fratoj*

oppure, con maggiore sottolineatura:

– *Estis ne sole Petro, sed ankaŭ ĉiuj miaj fratoj.*

Esistono altre preposizioni con più di un significato. Queste però, in generale, non causano equivoci. Ne accenniamo alcune:

En: mostra una posizione interna sia di un luogo sia di un intervallo di tempo. Ma è usata anche in modo figurato, come in italiano. Ad esempio:

– *Mi troviĝis en danĝero*

– Mi trovai in pericolo.

– *Oni parolas en Esperanto*

– Si parla in esperanto.

El: mostra un moto dall'interno all'esterno di un luogo, ma anche in senso figurato:

– *Ŝi vekigis el profunda dormo*

– Si svegliò da un sonno profondo.

– *Oni tradukis el la itala al Esperanto*

– Si tradusse dall'italiano all'esperanto.

– *Petro estas unu el miaj amikoj*

– Pietro è uno dei miei amici.

Si usa anche per indicare un materiale, come a sottintendere ‘proveniente da’:

– *Tiu ĉi statuo estas el marmoro*
– Questa statua è di marmo.

Survoje al la bona lingvo.

Da: la preposizione ‘da’ collega una espressione indicante una quantità con la cosa quantificata e si usa quando la quantità è espressa da un avverbio o da un sostantivo (non si usa se espressa da un aggettivo o da un numero). In italiano usiamo la preposizione ‘di’. Ad esempio:

– una decina di uomini → *deko da homoj*
– un po’ di pane → *iom da pano*.

Al contrario dell’italiano l’esperanto usa spesso l’avverbio come quantificante:

– molte persone = *multaj homoj*
– moltitudine di uomini = *multo da homoj*
in ambedue i casi in esperanto si preferisce:
– *multe da homoj*.



Da notare che non sempre si usa ‘da’ talvolta si usa ‘de’ con significato un po’ diverso. Un classico esempio: l’italiano “mazzo di rose” può essere tradotto con “*bukedo da rozoj*” o “*bukedo de rozoj*”.

Nel primo caso “*bukedo*” è una quantità:
– “*Kiom da rozoj vi volas?*”
– “*Mi volas bukendon da rozoj*”

Nel secondo caso “*bukedo*” è l’oggetto:
– “*Kian bukendon vi volas?*”
– “*Mi volas bukendon de rozoj*”.

Si usa ‘da’ solo se l’oggetto quantificato non è ben definito. Se è definito dall’articolo o da un aggettivo dimostrativo o da un pronome possessivo o in altra maniera,

diventa complemento di specificazione e si usa ‘de’.

Quindi: – “*donu al mi pecon de tiu pano*”
e non: – “*donu al mi pecon da tiu pano*”.

Non si usa ‘da’ nemmeno con vocaboli che non esprimono quantità:

Quindi: – “*glaso plena de vino*”
e non: – “*glaso plena da vino*”

perché ‘plena’ non esprime una quantità.

Po: questa preposizione, tipica delle lingue slave, non esiste in italiano, perciò è spesso usata da noi in modo errato. La si potrebbe tradurre con “in ragione di”, ha significato distributivo e viene posta prima di un’espressione indicante quantità (normalmente un numero) per indicare che tale quantità è assegnata a ciascuno. In italiano si usa l’espressione “cadauno / ciascuno”:

– “*Mi donis al la infanoj po tri pomoj*”
– “Ho dato ai bambini tre mele ciascuno”
– “*Ilia prezo estas po unu eŭro*”
– “Il loro prezzo è un euro cadauno”.

In generale possiamo evitare l’uso di ‘po’ ricorrendo a ‘ĉiu’:

– “*Mi donis al ĉiu el la infanoj tri pomojn*”
– “*Ĉiu el ili kostas unu eŭron*”.

Spesse volte si usa erroneamente ‘po’ al posto di ‘por’. Non si dice:

– “~~*Ĝia prezo estas 2 eŭroj po litro*~~”, ma:
– “*Ĝia prezo estas po 2 eŭroj por litro*”.

Zamenhof in LINGVAJ RESPONDOJ scrive:
Oni ne povas diri «je 80 centimoj po funto» aŭ «30 mejlojn po horo», sed oni devas diri «po 80 centimoj por (ĉiu) funto», «po 30 mejloj en horo».

Notare l’espressione: “100 km/h” si può dire: “*po cent kilometroj por horo*” o “*po cent kilometroj en horo*” o anche “*po cent kilometroj hore*”.

Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

HO VISTO LA LUCE

*Prima
che la notte mi fasci
nelle sue spire
ho visto la luce
del sogno più bello
più vero.
Non la fiaba
ma un caldo meriggio
dell'anima
prima di sera.
Ed è come un'alba
lucente
in cui le stelle
brillano ancora.*

CERCANDO STELLE

*Ho guardato il cielo
stasera:
cerco stelle.
Una sola,
piccola e lontana,
in un remoto angolo di cielo,
occhieggia, fibrilla,
mi parla.
Il palpito tremulo
trillando dice:
“vivi, ridi, ama...”
Seguo la piccola stella:
vivo, rido, e amo
e del bello, del buono della vita
colgo l'essenza.*

Anna Amorelli Gennaro

MI VIDIS LA LUMON

*Antaŭ
ol la nokto vindu min
en siaj volvoj
mi vidis la lumon
de la plej bela sonĝo
plej vera.
Ne la fabelon
sed varman tagmezon
de l' animo
antaŭ vespero.
Ĝi kvazaŭas tagiĝo
lumanta
en kiu la steloj
brilas ankoraŭ.*

SERĈANTE STELOJN

*Mi rigardis la ĉielon
ĉi-vespere:
mi serĉadis stelojn.
Ununura
eta kaj malproksima
en forega angulo de ĉielo
okulumas, flagretas,
parolas al mi.
La flagranta pulsado
trilante diras:
“vivu, ridu, amu...”
Mi sekvas la etan steleton:
mi vivas, ridas, amas
kaj el la belo kaj bono de l' vivo
mi kaptas la esencon.*

(esperantigis Norma Cescotti)

Mi estis fremda, kaj vi gastigis min

(Mat 25,35)

(Prelego de frato Pierluigi Svaldi dum la UECI-kongreso 2017)

Papo Francisko en sia Mesaĝo por la Monda Tago de la Migranto kaj de la Rifuĝinto (14an de januaro 2018) skribis tiele: «Ĉiu fremdulo, kiu frapas ĉe nia pordo estas favora ŝanco por renkontiĝo kun Jesuo Kristo, kiu en ĉiu epoko identiĝas kun la fremdulo akceptata aŭ rifuzata» (kp. Mat 25,35.43).


Jesuo mem diris: «Viglu, ĉar vi ne scias en kiu tago via Sinjoro venos. Estu pretaj; ĉar en horo, kiam vi ne atendas, la Filo de homo venas.» (Mat 24, 42. 44). La Filo de homo estas la Sinjoro en homa formo.

Akcepti Dion ŝajnas tre facile. Multaj el ni sin demandas, kiel la samtempuloj de Jesuo el Nazareto penis por lin akcepti kiel Filon de Dio fariĝintan homo. Ankaŭ ĉe evidenta miraklo ne estis facile kredi je Jesuo. Akcepti Lin kiel Dion ne estas antaŭvidebla afero, eĉ ne post forta spirita sperto, ĉar Dio restas ĉiam Aliulo, malsama ol ni, fremda al niaj travivadoj, el alia mondo. Li forigas nin malproksimen per tiel novaj kaj fascinaj konversacioj, kiuj tute ne similas niajn paroladojn, pripensitajn, profitcelajn, orientatajn al nia sukceso kaj al nia ĉiutaga vivo. Fakte nia penso estas senĉese subkondiĉa timo de la morto, vidata kaj sentata kiel eksterterano devigata forporti nin el nia mondo.

Kiam ni, disiĝante, ne akceptas la fremdulon kaj rifuzas la malsamulon, ni esprimas malsukceson, malkapablon eliri el ni mem kaj resti kun iu alia. Male kiam ni celas la unuecon en la malsamecon, eltenante penon kaj lacon, ni esprimas sopiron al la vivo kaj al la rilato. Unu el la du preĝoj, kiun la sacerdoto mallauĉe recitas antaŭ ol komuniigi ĉe la altaro, finiĝas tiele: “Ke mi neniam estu for de Vi”. Ĉiam estas la risko ne akcepti Dion, tiun veran, kaj male halti ĉe

nia dio, laŭmezure pripensita.

La du disĉiploj el Emauso rehejmiĝas ĉagrenitaj post la elreviĝo pri Jesuo el Nazareto mortinta surkruce, sed ili travivis la sper-ton esti akompanataj en la irado kaj en la legado de la okazintaĵoj, de fremdulo, komence rigardata kiel eksterlandano, kaj rekonata nur poste, kiam li, akceptita hejme por vespermanĝi kaj ripozi, rompas la panon de la akcepto (kp Luk 24, 13-35).



Antaŭ kvindek jaroj Michel de Certeau skribis tiele:

«Estas el nekonata deveno kaj kiel nekonato, ke la Sinjoro ĉiam alvenas en sian hejmon kaj ĉe la siajn: “Jen, mi venas kvazaŭ ŝtelisto” (Ago 16, 15). Tiuj kiuj kredas je li estas senĉese alvokataj rekoni Lin tiele, ĉu kiel fore loĝantan, aŭ el aliloke alvenintan,

nerekoneblan najbaron, aŭ disigitan fraton: alproksimigitan survoje, enŝlositan en malliberejoj, loĝigitan ĉe la senhelpuloj, aŭ ignoratan, kvazaŭ mitan, el regiono trans niaj landlimoj. Ankaŭ la “mistikulo” ĉiam enrompas en la eklezion kvazaŭ ĝenulo, tedulo, fremdulo. Tio okazas ĉe ĉiuj grandaj spiritaj aŭ apostolaj movadoj. Aliflanke, ĉiu kristano intencas fariĝi inkvizitoro, kvazaŭ tiu de Dostoevskij, kaj forigi la fremdulon.

Tio resendadas nin al io eĉ pli konsterna, sed fundamenta por la kristana fido. Dio restas la nekonato, tiu kiun ni ne konas, kvankam ni kredas je li; kiu estas ekster de ni, for de la homa sperto kaj de niaj rilatoj. Sed li estas ankaŭ miskonata, tiu, kiun ni ne volas rekonati, kaj kiu ne estas “akceptata” en sia hejmo, de siaj familianoj (kp. Joh 1, 11). Kaj pri tio, ni finfine estos juĝataj: ĉu ni akceptis la fremdulon, vizitadis la malliberulon, gastigis la aliulon? (kp. Mat 25,35-36)».

Kiam oni organiziĝas en societo aŭ oni kunmetas grupon, tuj naskiĝas la distingon inter tiu, kiu estas ene, kaj tiu, kiu estas for, tiu, kiu estas el niaj, kaj tiu, kiu estas ekstera. El tio ĉi fontas la principo de forigo kaj netolero. Por sin defendi kontraŭ la fremdulo, oni klopodas lin ensorbi aŭ apartigi. Ankaŭ ni, kun la preteksto kompreni la aliajn por ilin akcepti laŭ nia kono pri ili, ni kondutas ĝuste tiamaniere. La historio pruvas, ke tiu ĉi tento ĉeestas ankaŭ inter la kredantoj. Ni demandu nin: ĉu eblas societo, kiu atestas Dion, kaj ne sin limigas fari el Dio sian proprajon?

La kristana sperto rifuzas tiun ĉi adaptiĝon al la leĝo de la grupo, kaj preferas esti altirata ekster sin de tiuj “eksteruloj”, kiuj forprenas ĝiajn posedaĵojn kaj metas en diskuton la akiritajn prilaborojn kaj instituciojn.

En alia artikolo Michel de Certeau klariĝas ke Dio estas tiu Aliulo sen kiu vivi ne plu estas vivi. Kiam Jesuo eldiras la paroladon pri la pano de vivo, multaj foriras, asertante ke li estas freneza. Al la demando de Jesuo,

direktita al la disĉiploj: “Ĉu vi ankaŭ volas foriri?”, Petro respondas: “Al kiu ni iru, Sinjoro? Vi havas vortojn de eterna vivo” (Joh 6, 67-68). Petro ne volas perdi tion, kion li komprenis pri si mem, restante kun Jesuo. Skribas Michel: «Jesuo ne estas tio, kion li posedas, sed tio sen kio vivi ne plu estus vivi. Li estas jam la esenco, kaj restas malsama, necesa, kaj nekaptbla».

De vidpunkto kaj kolektiva kaj persona, la kristana itinero estas el tiu ĉi tipo. Tion ĉi oni vidas en la apostola kaj misia movado. Eĉ se volante konverti, la movado havas la celon rekonati Dion tie, kie, ĝis nun, li ne estas perceptata. Ekiri al la dezerto, aŭ al fremdaj landoj estis kvazaŭ fuĝi el la kristanaj urboj, kie la fido riskas enfermiĝi en si mem, komforte sidanta sur iaj regadoj kaj iaj sistemoj; estas la komenco de vojaĝo al landoj, lingvoj kaj kulturoj, en kiuj Dio parolas lingvon ankoraŭ ne elkodigita kaj ne registrita. La ekiro adresas la pilgrimanton al la surprizo. Ĝi tradukas la certecon, ke Dio estas la nekompreneblulo, sen kiu neblas esti kristanoj kaj homoj. Solidareco de la fido ligiĝas al tiu ĉi nekonato. Tiu eksterulo ne ĉesas esti (en la ama senso de la termino) tiu, kiu mankas al la kristanoj. En la persona sperto, la Eksterulo estas samtempe la ĝisostulo kaj tiu sen kiu vivi ne plu estas vivi».

Akcepti Dion estas sperto, kiu povas esti legata poste, ne dume. Estas malpermesite al ni posedi Dion: Li estas pli granda, Li estas la Plejaltulo, antaŭ kiu aperas pli evidenta niaj fragileco kaj malfirmeco, ĉar li estas Iu malsama ol ni.

Dio estas tiu Patro mizerikorda, kiu permesas al la homo libere foriri; estas tia Realaĵo kiu atendas ĉiutage la revenon de la homo por doni al li la plenplenan vivon, de ĉiam promesitan kaj gastigitan en ĉiuj; Li estas la Celo de ĉia homa ekzistado, atingebla de ni nur se ni transpasos tiun benatan morton, kiu devigas nin ĉiujn eliri el niaj efemeraj certecoj por nin konfidi al Li, malkovrata kiel la vera Fremdulo kaj Enmigrinto.

32^a UECI-kongreso

Milano: 4-7 de Septembro 2018



Milano: Oasi di San Francesco (foto del 1968)

Il 32^o congresso UECI si terrà a Milano presso l'*Oasi di San Francesco* dal pomeriggio di martedì 4 a venerdì 7 settembre 2018. La data e la durata sono stati scelti in base alle decisioni prese nell'ultima assemblea di Codogno. Il luogo è facilmente raggiungibile da tutta Italia con il treno e i mezzi pubblici di Milano (si trova a circa 500 metri da una stazione della metropolitana). Purtroppo il kongresejo non ha un parcheggio interno per cui chi verrà in auto dovrà cercarsi un posto sulle strade adiacenti.

Il tema proposto per quest'anno è suggerito dall'ultima esortazione apostolica di Papa Francesco, **Gaudete et Exsultate**: un invito alla santità a cui noi tutti siamo chiamati.

Quest'anno inoltre ci sarà l'elezione del nuovo Comitato Centrale. Sollecitiamo le candidature: chiunque sia disponibile ad offrire un po' del suo tempo o delle sue competenze per collaborare nella gestione dell'UECI si proponga; basta segnalarlo quanto prima al presidente o a uno dei consiglieri uscenti. Le condizioni stabilite dallo statuto sono: aver compiuto i 16 anni di età ed essere iscritto

all'UECI nel 2017 e 2018; non sono previste ricompense su questa terra, ma una futura in cielo, come suggerito dal tema del nostro incontro.

I prezzi sono quelli dello scorso anno:

20 € per l'iscrizione

150 € in camera doppia

170 € euro in camera singola

(sconto del 50% per ragazzi di età inferiore ai 14 anni)

La quota comprende pensione completa dalla cena del 4 al pranzo del 7 settembre e le escursioni. L'iscrizione è valida solo dopo il pagamento dei 20 €.

Attenzione: dobbiamo riferire il numero dei partecipanti entro la metà di luglio per cui è necessario che l'iscrizione ci pervenga prima di quella data, per questo quanto prima vi verrà inviato l'aligilo con la lettera di indizione dell'assemblea. Già da ora l'aligilo si può scaricare e/o compilare direttamente dal nostro sito:

<http://www.ueci.it/aligxiloj>.

e potete inviarlo per e-mail a:

katolika.sento@ueci.it

oppure, per posta, a: *Gianni Conti*:

via F.Filzi, 51 – 20032 CORMANO (MI)

oppure a: *Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI): via Lombardia, 37
20099 Sesto S. Giovanni (MI).*

Per informazioni o richieste particolari telefonare a: *Gianni Conti: 02 66301958*
o a: *Giovanni Daminelli: 02 2621149*
o per e-mail a: katolika.sento@ueci.it

Il sito dell'Oasi di San Francesco è:

<http://www.oasiaccoglienza.it/>

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

Solo ora veniamo a sapere che il 19 dicembre 2017 a Vercelli, è deceduto all'età di 83 anni un dei nostri associati: monsignor Sergio Vercelli. Membro del Capitolo Metropolitano della cattedrale di sant'Eusebio, ordinato prete nel 1963, nel 1968 fu nominato segretario arcivescovile e dal 1989 al 2013 fu parroco della cattedrale di Vercelli. Era uno dei uomini più amati della città. Benché fosse uomo di profonda cultura, nelle sue omelie non disdegnava l'uso del dialetto per essere ben compreso anche dalle persone più umili. Era assistente diocesano del gruppo UECI di Vercelli e ogni anno officiava in Duomo una Santa Messa in suffragio degli esperantisti defunti. Rivolgiamo una preghiera perché venga accolto dal Padre tra i suoi eletti.



NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2018

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Espero Katolika</i> (SS)	44,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte. I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono 2,10 € per l'associato ordinario e 1,05 € per l'associato giovane o familiare.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.*
 codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPHITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: Norma COVELLI GESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Segretario./cassiere: fra Pierluigi SVALDI, p.za S. Francesco, 1 - 38057 Pergine Valsugana (TN) – tel. 0461.531109

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via Santa Bernardette 6 [sc. B – int. 8], 00167 Roma

Addetto alla logistica: Felice SOROSINA, Via Sarnico 17, 24060 Tavernola (BG) – tel. 035.932298 –

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECI.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it) - sendis Tiziana Fossati

Golfludo

Pastro, kuracisto kaj inĝeniero golf-ludonte atendas ĉe la apuda trinkejo, ke la golfejo liberiĝu. Sed pasas horoj kaj ĝi daŭre estas okupita. Pro tio ili plendas ĉe la golfejestro. Li petas ilian komprenon klarigante:

– Antaŭnelonge okazis akcidento al grupo de niaj golf-klubanoj, kaj ili blindiĝis. Pro tio ili bezonas pli da tempo por finludi.

Tuj la pastro diras:

– Terure! Mi multe preĝos por ke ili reakiru la vidpovon.

La kuracisto diras:

– Jes, terurege! Mi konas tre lertan okul-kuraciston; mi parolos kun li, eble li povos kuraci iliajn okulojn.

La inĝeniero diras:

– Jes, terure, sed kial ili ne ludas dumnokte?

Fajro-viktimo

Homo iras de pordo al pordo petegante:

– Mi bezonas monhelpon, ĉar mia hejmo brulis; la fajro detruis ĉion.

– Ĉu vi havas atestilon de la fajrobrigado, kiu konfirmas tion?

– Mi havis, sed ankaŭ ĝin la fajro bruligis.

Inter frenezuloj

– Ĉu vi scias kioma horo estas nun?

– Jes, mi scias.

– Dankon!

Dum ekzameno

Profesoro al ekzamenato:

– Ŝajnas, ke mia demando estas tro malfacila por vi.

– Ne la demando, profesoro, sed la respondo.

Inter vaguloj

Du vaguloj renkontiĝas:

– Kie vi loĝas?

– Nenie.

– Do ni estas najbaroj!

Skoto 1

Edzino de skoto estas grave malsana kaj preskaŭ mortanta, pro tio li eliras por voki kuraciston, sed antaŭ ol eliri, li sin turnas al sia edzino kaj diras:

– Karulino, mi eliras por venigi kuraciston. Se intertempe vi sentas vin proksime de la fino, ne forgesu malŝalti la lumon, kiu estas apud la lito.

Skoto 2

Skoto estas grave malsana kaj preskaŭ mortanta, pro tio lia edzino daŭre en- kaj eliras la ĉambron de la malsanulo por informi la parencojn pri lia sanstato, ĉar, ŝajne, temas pri iliaj lastaj vivminutoj. Sed, post kelkaj tagoj, li ankoraŭ vivas, kaj ŝi diras al la parencoj:

– Mia edzo estas tiom granda avarulo, ke li ne volas fordoni eĉ la lastan spiron.

[www://www.ueci.it/k_sento/ks_2018/](http://www.ueci.it/k_sento/ks_2018/)

